# Sur sunbrilaj vojoj

*Napfényes utakon*

*Ĥoraĵo: Bárdos Lajos – Teksto: Vargha Károly*
*Al Esperanto tradukis: Szögedi Antal*






*Soprano:*

Novas fajro en kora fund',
Novas la kant' de l' vivemo.
Froston rompis varmiga lum',
Burĝonas viv' el la tero.
Frondoj flirtas kun gaja vento,
Suno brilas al la vojeto.

Ĉu vi ek al voj', kamarad',
Al monto, valo, rojeto?
Nin atendas belplena land',
Ĉu vokas vin la vagemo?
Venu, kantu kun brava sento,
Vintro foras sen makuleto.

*Aldo:*

Novas fajro fine en kora fund',
Novas la kant' de l' vivemo.
La froston rompis varmiga lum',
Burĝonas viv' el la tero.
La frondoj flirtas lude kun gaja vento,
Suno brilas al la vojeto.

Ĉu vi ek al nova voj', kamarad',
Al monto, valo, rojeto?
Atendas nin la belplena land',
Ĉu vokas vin la vagemo?
Do venu, kantu kun ni, kun brava sento,
Vintro foras sen makuleto.